

Lernejaj Lingvaj Festivaloj en Kaluga

La 2-an de marto 2013 en la antikva rusa urbo Kaluga tre sukcese pasis la dua Kaluga Lingva Festivalo. Ĝi estis tiom impona kaj sukcesa, ke eblas senhezite diri: la lingvafestivala movado en la urbo stabiligis, maturigis kaj montras firman tendencon plu evolui.

Sur la fronta paĝo de la Programo ĉiu vizitanto povis legi, ke la Festivalon organizas la Administrejo pri klerigado de la urbo Kaluga (Управление образования города Калуги), asistata de la Moskva Esperanto-Asocio “MASI”, Kaluga ŝtata universitato K.E.Ciolkovskij, Kaluga filio de la Moskva ŝtata teknika universitato N.E.Bauman, Kaluga filio de la Ruslanda ŝtata humanitara universitato.

Kial la nomo de nia Asocio okupas en tiu ĉi impona listo la unuan lokon? Ĉar la antaŭhistorio de la juna Kaluga festivalo komenciĝis en Moskvo, kien por la 5-a Moskva Lingva Festivalo en 2010 venis granda grupo de kalugaj lernejoj, organizita de Maria Turilova, la oficistino de la urba Administrejo pri klerigado. Por la sekva jaro al la MLF antaŭaliĝis jam 60 lernejoj de Kaluga – kaj tio kaŭzis la neplanitan eventon: la 1-an Lernejan Lingvan Festivalon en Moskvo, kiun ni organizes en la Pedagogia koleĝo N15. Enkadre de ties programo estis nekutima ero: la Konversacia Rondo por lernejaj instruistoj kaj gepatroj pri la temo “Ĉu indas organizi apartajn lingvajn festivalojn por lernejoj?” Dum la kunveno la reprezentantoj de Kaluga, inspiritaj de niaj garantioj pri ĉiaspecaj subtenoj, decidiĝis organizi la propran lernejan LF en sia urbo. Kaj la 21-an de aprilo 2012 la 1-a Kaluga Lingva Festivalo sukcese pasis en unu el la plej bon-renomaj urbaj klerigejoj – la gimnazio №24. En tri blokoj estis prezentitaj 27 prilingvaj prezentadoj kaj prelegoj, 15 el kiuj faris la speciale alvenintaj moskvaj festivalanoj. Inter tiuj 9 programerojn gvidis la 5 masianoj. Do, la organizantoj de la unua KLF laŭrajte estis la Administrejo pri klerigado de la urbo Kaluga kaj la Moskva E-Asocio “MASI”. Dum la Solena Malfermo la reprezentantoj elpaŝas kun salutvortoj, tiel la kaluganoj ekscias pri MLF, MASI kaj Esperanto, kaj la prezentado de Esperanto kolektas plenan klasĉambrom de scivolemuloj.

En la nuna jaro la listo de la organizantoj impone kreskis. Kreskis ankaŭ la kontribuoj de la lokaj specialistoj, la kvanto de la partoprenantoj kaj famo de la evento en la urbo. Malgraŭ ke trafi la Kalugan Festivalon, kaj eĉ ekscii pri ĝi, iĝis ioma problemo – ĉar partopreni ĝin rajtas nur organizitaj grupoj de infanoj el la urbaj lernejoj, speciale invititaj.

La duan Kalugan festivalon denove gastigis la gimnazio №24 – kies 300-seĝa solenejo jam ne povis liveri sidlokojn por ĉiuj ĉeestantoj. Je la 11-a horo ĉi tie kolektiĝis gelernantoj-lingvemuloj el la dudeko el la urbaj lernejoj. Kiel kunordiganto de la Moskva Esperanto-Asocio “MASI” kaj direktoro de la Moskva lingva festivalo, en la malgranda salutparolo mi klarigis, kial ĝuste esperantistoj lanĉis la lingvafestivalan movadon kaj menciis, ke la kreinto de Esperanto Ludvig Zamenhof traktis ĝin kiel la lingvon duan post la gepatra kaj komunan por ĉiuj.

Dum la Festivalo estis prezentitaj 30 programeroj, disdividitaj je tri 40-minutaj blokoj. Enkadre de la unua bloko mi prezentis Esperanton. La seĝoj en la 30-loka klasĉambro ne sufiĉis, oni devis alporti kromajn el la najbaraj klasoj. Ĉiuj aŭskultantoj estis gelernantoj de la plej diversaj aĝoj – kaj ĉiuj estis tre atentaj kaj aktivaj. Ili multe ĝojis al la disdonitaj flugfolioj kaj broŝuroj, ĉiuj deziris daŭrigon, kelkaj lasis siajn retadresojn. Feliĉe inter la gastoj estis la nova esperantistino el Kaluga Julia Tenengolc, ĵus antaŭ semajno vizitinta la masian E-paroligan renkontiĝon Aperio-7. Ŝi promesis plu zorgi pri la dezirantoj lerni Esperanton.

Intertempe en la solenejo, iom malpli plena kompare kun la Malfermo, prezentis la japanan lingvon alia masiano, la fama festivalano Miĥail Ĥaminskij. En la dua bloko, same en la solenejo, li prelegis pri la iberiaj lingvoj kaj en la tria – pri la slavaj. En la dua kaj tria blokoj la masianino Julia Samsonova (konata kiel Klera) prezentis la hebrean kaj tok-pisinon. Intertempe mi estis intervjuita de la urba televido “Nika” – kaj traktis kun la kaluganoj eblecojn pri aliaj kunaj projektoj.

La programon de la II Kaluga LF kronis la belega kaj vere festa koncerto, farita de la plej brilaj infanaj artaj kolektivoj de la urbo. Ĉiuj prelegintoj ricevis la Dankleterojn de la Administrejo pri klerigado de la urbo Kaluga. Ĉiuj vojaĝ-, loĝ- kaj eĉ manĝ-elspezoj de la gast-prelegintoj denove estis kompensitaj de la invitinta organizaĵo.

Nun antaŭ la kalugaj organizantoj staras granda problemo: organizi la Festivalon, malfermitan por ĉiuj urbanoj. La studentoj, la gepatroj de la lernejoj insistas pri sia rajto partopreni la novtipan klerigan eventon en la urbo.

Laste, sed ne balaste. La ekzemplo de Kaluga mantras, ke ankaŭ neesperantistoj scipovas organizi bonegan Lingvan Festivalon, se ili studas nian sperton, sekvas niajn rekomendojn kaj havas nian atenton kaj helpon – ne nur kuraĝigan kaj konsilan, sed ankaŭ kontribuan. Dank’al tiu ĉi kunlaboro pozitive famigas sin esperantistoj kaj Esperanto akiras renomon, estimon kaj prestiĝon. Mi alvokas ankaŭ aliajn urbojn sekvi la kalubanojn – kaj flanke de “MASI” kaj MLF vi ĉiam ĝuos subtenon!

Irina Gonĉarova,
direktoro de Moskvaj Lingvaj Festivaloj,
kunordiganto de la Moskva Esperanto-Asocio “MASI”
<http://ek-masi.weebly.com>